1-a Jaro, N-o 31

APERAS SEMAJNE — S.A.T.

30. Aprilo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz	Gvidanto: E. LANTY 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

LABORISTA MAJO

Proletoj de la mondo unuiĝu!

Ekzistas tagoj, dum kiuj ni pli forte, pli akre sentas la gigantan movadon de la klasaj fortoj, taksas sub inspiro de plensignifa horo klarvide la pozicion de la titaneca klasbatalo, kiun trudas al ni historia neceseco. Tagoj, dum kiuj ankaŭ al nekonsciaj, senpripense por la kapitalo laborantaj proletoj prezentiĝas demonstrative — eĉ kvankam ofte nur dum kelkaj sekundoj rapide fortrenantaj kun si la estingiĝeman, timeman penson — impresive la problemo: Kia ci estas, — kaj kia ci *devus* esti!

La plej impresema tago tiaspeca por konscio de ĉiu laborulo estas la tago de l' **unua de majo**. La sento por la kolektivo dum neniu alia manifestado trovas tian fortan grundon, ol en la tago de l' unua de majo, kiam homoj-laboruloj proteste ĉesigas laboron, solenas, demonstradas, kiel unueca klaso por siaj klasaj celoj. Certe la plej rimarkinda fakto estas la universaleco, la internacieco de tiu tago. La signalo "Proletoj de la mondo unuiĝu!" estas la gvida devizo de l' unuamaja manifestado. Tial la unua de majo vidas la ruĝan standardon malvolvitan en ĉiuj landoj de la tero, en ĉiuj urboj, kiuj grupigas la proletamasojn, vidas sur la stratoj la masojn dense marŝantajn kaj entuziasme kuniĝantajn, minace por burĝo filistra, kiu sidas hejme en plej malantaŭa parto de sia loĝejo por ne esti frapata de la ŝanĝoj en fizionomio de la strataro. Kaj laŭ la spirito kaj la disciplino de la masoj tia manifestado vere povas imponi kaj timigi la burĝaron. Laŭ efiko kaj procedo de tiu tago en ĉiuj ĝiaj detaloj ĝi scias tute precize, en kia stato troviĝas



Th. Steinlen (Paris)

la proletaro, kian gradon da intenseco atingis la minaco, kaj ĉu ĝi ne nur restis vanta gesto de protesto.

Do restas nia tasko zorgi pri tio, ke ni plene kaj ĝislaste elĉerpu la eblecojn de la hodiaŭa stato, en kiu troviĝas la proletara movado, faru tiun tagon inda je ĝia difino. Ni ja ne travivas tian veran majotagon, kian ni ideale, anime sopiras. La ideoj por kiuj ni kuniĝas manifestante, estas la samaj kiel antaŭ longe. Ili restis tiaj, konservis la samajn formojn kaj la saman esprimon, ĉar nenion ni sciis ŝanĝi en la situacio, nenion forpreni de la kapitalo (kun unu escepto: vasta Sovetio). La ribelpostuloj restis la samaj, la pozicioj konkirotaj, kaj restis la tasko doni al ili formon esprimplenan en tiu tago, en kiu tutmonda proletaro fiksis sian demonstradon.

Estus alia sento, estus festo de homaro, se liberiĝintaj ni povus festi la tagon. Sed hodiaŭ? Festi? — Nur venkinto rajtas festi. Aŭ ĉu tiu soleneco en nia brusto, tiu solidariĝo en kolektivsento kun la fratoj de unu klaso povas esti nomata — festado?

Ho jes, lumaj nuancoj ekzistas, ankaŭ en tiu maja tago de subpreматoj kaj neliberiĝintoj.

Ni vidas la gejunularon, maturiĝantajn klaskamaradojn, kiuj entuziasme sentas kaj serioze, vereme pensas kaj estas decidintaj ĉiujn dubojn kaj skeptikojn miskreditigi. Kaj — ni pensas pri niaj fratoj en Sovetio, tiel kiel ili pensas pri ni. Ni estas pli proksimaj ol kutime en tiu tago unu al la alia. Helpeme ili etendas siajn manojn. Nura gesto hodiaŭ. Eble pli — morgaŭ jam. Ni helpos al ili, kiel ili helpas nin. Solidareco! La fundamento de nia batalo. — Kaj ni scias, eĉ se ili festas senĝene, ne minacate de policaj bandoj pretaj por ataki el embusko, — ni scias, ke iliajn korojn premas la imago pri subpremo de fratoj en okcidento, de

fratoj en imperialistaj kolonioj ekspluatataj kiel neniuj aliaj. Tiaj pensoj flugas pli malpli impreseme tra niaj cerboj. Nin anojn de sennacieca idealo certe pli forte ili okupas ol la multajn. Ni en tago de unua de majo ne nur vidas la brilantajn flamkolorajn standardojn super niaj kapoj, ni ankaŭ vidas la nigrajn nubojn pelatajn sur ĉielo de ventego muĝanta.

Nenia printempa suno alridas karese la proletaron, dum ĝi suferas sub jugo kaj estas dumvive turmentata je pli granda profito de reganta klaso. Neniu varma maja tago povos esperigi sklavojn per iluziaĵoj je promesita libereco. Sed arda brulado restas en la brusto, sento akre mordanta, sento kiu ŝanceliĝantajn ne lasas pleniĝi de subiĝemo senkontraŭstara. **Batalemo** kiel signo de maja tago, ribelemo anstataŭ malkuraĝo! Ni estu batal-uloj, sed ne festemuloj je l'unua maja tago. En ĉiuj landoj larĝiĝas kun granda impertinenteco la nigra reakcio. La ĉefajn regnojn ekposedis malkaŝe reakciaj registaroj. Ni devas klare vidi tion, por konkludi ke la klaskontrastoj pliakriĝas kun evolua logiko, kaj ke ni urĝe devas formi la klasan fronton tre firme, solide, unuece. Kamaradoj! Manojn interplektante trans ĉiujn limojn, neĝenate per rasaj aŭ lingvaj diferencoj, ni juru en la unua maja tago, ke ni ne volas ripozi, ne volas halti, antaŭ ol estos plenakirita la venko de l'proletaro en la tuta mondo, kaj la vojoj liberaj por ekmarŝo en luman estontecon de nova socio!

"Sankta" jaro ĉe Vatikano

Post ĉiu 25-jara periodo oni festas en Romo t. n. "sanktan" jaron. Tiu ĉi festo rezultigas ĉiam amasan pilgrimadon, kiun povas partopreni nur la katolikoj kun plenplena monujo. Roma eklezio ĉiam celis profitege utiligi por si fanatikismon de l'popolamasoj, pilgrimantaj olim[1]) al "sanktaj lokoj" en Jeruzalemo. Kaj jen de-post 14. jc., la kredantoj pie falas teren antaŭ la "ĉerkoj de Petro kaj Paŭlo" kaj per tio pligrandigas monan enhavon en kaso de Papo.

Romo estas lukse ornamata por gastame akcepti la kredantojn kaj . . . prirabi ilin.

La preĝejoj estas lukse ornamataj per broditaj silkajoj, sur la altaroj reklame estas ekspozataj la oferaĵoj ktp. Grandegaj hoteloj estas speciale aranĝitaj por pilgrimantoj, kun amerikana rapideco estas konstruitaj monstraj restoracioj por nutrado de amase venantaj piuloj. Multaj etburĝaj familioj "oferis" ĉambrojn por havi "sian pilgrimulon" kaj per tio senkostigi por si la tutan loĝejon. Amaso de l' parazitoj kaj ĉiuspecaj friponoj sin preparas por ekspluati la kredantojn. La foiro estis perfekte organizita. Ĝi estis malfermita kun kurioza ceremonio. Meze de la profunda silento Papo ekfrapetis per ora marteleto fermitan pordegon, kiu sub malforta frapo de l'kaduka maljunulo malfermiĝis kvazaŭ laŭ movo de l'magia bastoneto kaj liberigis la trairejon.

Tra tiu ĉi pordo iros la pilgrimantoj kaj per aĉetataj indulgiloj ricevos pardonon de l'pekoj ne nur por si mem, sed ankaŭ por siaj parencoj en purigejo; 20-foje dum 25 tagoj la pilgrimantoj devas trairi tiun ĉi pordon kaj nur tiam ricevos certan pardonon de ĉiaj pekoj.

Papoj riĉiĝadis per tiu ĉi indigninda trompo je l'naivuloj. Tion evidentige pruvas la fakto, ke tiu ceremonio estinte okazadis post ĉiu 100-jara periodo, pli malfrue — post 50-jara periodo, kaj nun oni havas por okazigo de tiu profitdona festo nur 25-jaran periodon. Dum 700 jaroj la ceremonio de sankta jaro ne okazis nur unu fojon — en franca revolucio. En jaro 1600 oni kalkulis ĉ. 3000000 da pilgrimantoj, venintaj en Romon.

En tiu ĉi jaro la sukcesigo de l' "sankta jaro" ne estas tute bonŝanca. Malfavoraj cirkonstancoj estas unuflanke altaj vivkostoj en Romo, en kiu ekz. panprezo kreskas ĝis neordinara nivelo; aliflanke — la kredantoj estas malkvietigitaj de nuna politika situacio de faŝista Italio, dank' al kiu oni preferas resti kun nepardonitaj pekoj por ne riski malagrablajn eventualaĵojn dum sia surtera vivo en Romo.

Tamen ne nur pro tio la festo de sankta jaro nun estas speciale notinda. Estas ankoraŭ kelkio direnda por karakterizo de Vatikano mem. La reĝo de Vatikano, sin nomanta posteulo de Kristo sur la tero, antaŭ komenco de l'sankta jaro eldiris publikan paroladon pri socialismo kaj esence kontraŭ Sovet-Unio. Menciante pri katolika misio, kiu revenis el Sovet-Ruslando, li interalie diris, ke la eklezia devo estas lukti kontraŭ venena influo de socialismo kaj evitigi tiun danĝeron, kiun kunportas socialismo kaj komunismo. Papo estis alvokanta organizi tiun lukton per opaj penoj kaj petegi la Ĉiopovan dum la sankta jaro, ke Li efektivigu la deziron de l' piuloj. Tiu ĉi parolado estis publikigita baldaŭ post vizito de Ĉemberlen (Chamberlain) al Vatikano kaj tiu de angla ministro por eksterlandaj aferoj.

La vizitoj de regantaj altranguloj al Vatikano estas ordinaraj fenomenoj en internacia politiko.

Lasta milito iom ŝanĝis la interrilatojn de Vatikano kaj kapitalismaj regnoj, sed ĝi ne malestigis ilin. En imperialisma politiko de grandaj ŝtatoj Vatikano ludas gravan rolon. Multaj registaroj havas ĉe Vatikano konstantajn ambasadorojn, elspezante grandajn sumojn por ili.

Iu el kongregacioj de Vatikano administras la lernejojn kaj diversajn institutojn, kiuj ĉiujare havigas al Vatikano armeon da agentoj por diversaj celoj. Junaj, fizike sanaj homoj uniforme vestitaj per monaĥaj roboj, ili estas kriple edukataj por rolo de l'eklezia oficisto. En Romo tiuj ĉi papaj edukatoj povas konsistigi kelke da batalpretaj regimentoj, kiuj povos kuraĝe batali. Por konstantigo de tiu armeo Vatikano elspezas grandajn monsumojn.

Ĉe Vatikano funkcias ankaŭ la aliaj kongregacioj, kiuj havas aferan karakteron de ministerioj. Ĉe Papo mem ekzistas sekretariaro, kiu esence estas ministerio por internaj aferoj.

Sed Roma papo direktas sian laboron ne nur per tiu ĉi granda aparato funkciigata de l'monakoj, kardinaloj kaj ekleziaj oficistoj ktp. Li ankaŭ influas per ĵurnaloj. Krom oficiala papa ĵurnalo, eldonata ĉe Vatikano, en Romo eldoniĝas multe da diversaj katolikaj presorganoj, kiuj akcelas la saman politikon por stultigo de l'popolmasoj.

La senhalta kaj regula funkciado de tiu ĉi granda aparato estas ĉiam garantiita per grandaj enspezoj de Vatikano. Krom tiuj monsumoj, kiuj inunde venas en papan kason dum "sanktaj" jaroj, Vatikano havas multajn aliajn fontojn de l'profito. En Vatikano estas kolektitaj multenombraj valoraĵoj el oro kaj juvelaĵoj, unikaj artaĵoj, kiuj estas konataj de l'tuta mondo, kiel ekz. majstraj verkoj de Rafael, Tician, Perugio, Corregio kc., senfinaj galerioj kun skulptaĵoj kaj marmoraĵoj, kreitaj de grandaj artistoj, komence de l'malnovaj epokoj, galerioj de gobelenoj, freskoj, tapiŝoj, bibliotekoj ktp. Ĉiuj ĉi valoraĵoj, akumulitaj dum multaj jarcentoj, estas instalitaj en tuta labirinto da ĉambregoj, kiuj estas ĉiutage viziteblaj por pagintoj altan enirpagon.

Per miloj da siaj vizitantoj Vatikano ricevas grandan enspezon. Ne malpli grandan profiton ĝi ricevas per siaj bankoj, kiuj laboras kiel ĉiuj bankoj de l' kapitalistoj, laŭ maniero de ordinaraj pekuloj. Laŭ dekreto de itala registaro depost 1871 j., Vatikano ĝuas liberecon je ĉiaj ŝtataj, provincaj kaj urbaj impostoj kaj senpagan servon de poŝto, telegrafo kaj aliaj tutlandaj institutoj.

Oni malfacile povos diveni proksimuman sumon de papaj elspezoj. La buĝeto de Vatikano neniam estas publikigata. Tamen apud la temploj kaj samtempe kun predikoj en kaŝitaj kontoroj de Vatikano ĉiam frapetas la kalkuliloj kaj lertaj libro-tenistoj registras enspezojn kaj elspezojn de ĝi.

Ne esperante sole pri helpo de Dio, posteulo de Kristo sur la tero por gardado de sia palaco kaj havaĵo establis grandan etaton de laika dungitaro. En tiu ĉi etato troviĝas generaloj, koloneloj, oficiroj, nobeloj, elektitaj ĝendarmoj, amaso da servistoj kaj ceteraj oficistoj.

La armeo de Vatikano estas riĉe provizita per modernaj armiloj kaj ĝue vivas en escepte bonaj kondiĉoj; nur dekoranta enirojn de Vatikano malgranda parto de tiu armeo estas vestita per mezepokaj uniformoj, laŭ desegnoj de Mikael-Angelo.

[1]) olim = iam antaŭlonge, — en malprecize memorata tempo; f. = jadis.

Nun amikaj rilatoj stabiliĝis inter Vatikano kaj itala registaro. Vatikano garantias per sia aparato la subtenon al politiko de Mussolini kaj pro tio havas rajton instrui pri religio en ĉiuj ŝtataj lernejoj ktp.

Per politikaj partioj Vatikano influas en parlamento, partoprenas en socia laboro, fondas kristanajn laboristajn sindikatojn, kooperativojn kc. Per sia potenca aparato Vatikano akcelas unuigon de regantaj klasoj kun la religio por komuna lukto kontraŭ hidro de l'revolucio.

Kelkiuj sincere kredas, ke Vatikano subtenas nur katolikan eklezion. Tiu ĉi opinio estas erara. Vatikano estas unika citadelo de l'religio, kiu en nia epoko defendas ĉian religion kaj eklezion, al kiuj minacas katastrofo. La estroj de Vatikano bonege komprenas, ke kiam ruiniĝos ajna religio, tiam venos la sama sorto por la alia. Tial por subteno al mahometana religio kaj tiuj de orientaj popoloj ĉe Vatikano nun estas establita "fako por orientaj religioj", kies tasko estas organizita laboro por stultigo kaj trompado je orientaj popolmasoj, vekitaj per eĥo de proletara revolucio en Sovet-Ruslando.

Anoncante la komencon de "Sankta" jaro Papo alvokis ĉiujn fortojn por la lukto kontraŭ socialismo kaj komunismo. Sen apartaj komentoj oni komprenas, ke multebranĉa aparato de Vatikano laŭiĝos sian agadon konforme al parolado de Papo. De nun tiu agado estos malkaŝe direktita kontraŭ Sovet-Unio. Dum "sankta jaro" Papo esperas ĉiufronte vigligi agadon de Vatikano kaj samtempe insidan agadon kontraŭ Sovet-Ruslando esperante per tio ankaŭ subteni degelantan aŭtoritaton de l'eklezio.

Sed la alvoko de Papo estas malfrua. Oni nun povas nedubeble aserti, ke ĝi ne aŭdigos respondan eĥon en popolmasoj.

La proletaro scias jam, kio estas la socialismo kaj el kies buŝoj oni povas aŭdi verajojn pri Sovet-Unio.

Tamen Vatikano, kiel la citadelo de l'religio, estas la plej reakcia forto, baranta la malglatan vojon de laborista movado en Hispanio kaj Italio. Krom la ceteraj obstakloj, malhelpantaj la lukton por socialismo en tiuj landoj, laborista klaso devas venki nigrulan forton de Vatikano. La alvokon de Papo eŭropa proletaro devas ekaŭdi kaj dece kontraŭagi ĝin per antireligia propagando. *N. Krassovski.*

Kio okazas en Germanio?

Tra reakcia gazetaro germana iras triumfa voko: Hindenburg kandidato de la "regna bloko"! Hindenburg post meditado sincera akceptis la kandidatecon! Kion signifas tio? Por trafe kompreni tion, necesas analizi la okazintaĵojn depost la "revolucio" 1918. La "revolucio" 1918 forigis dinastion, la kronoj rulis en polvon, ekestiĝis "respubliko", la plej libera de la mondo. Sed baldaŭ montriĝis, ke kapitalismo ankoraŭ vivas. La kapitalistoj bonege komprenis akomodi sin al la cirkonstancoj. Ŝanĝiĝis nur la titolo. La korupcia kapitalista klaso uzis nun la elpendaĵon "Respubliko Germana". Dum la unuaj jaroj depost 1918 ili kaŝe kaj taktike agis, koaliĝante kun socialdem. partio, sed ĉiam tamen klopodante havigi al si senperan potencon. La unua provo tion efektivigi okazis dum la jaro 1920 (Kapp-puĉo), sed pro unueca kontraŭstaro de la laboristoj la monarkistoj malsukcesis. Depost tiu tempo ili pli taktike kaj subtile agis, por atingi siajn dezirojn per pacaj rimedoj, kaj ili plene sukcesis, dank' al la "Dawes-plano", kies efikon la proletaro nun komencas eksenti je la propra korpo. Oni nun kredas sin sufiĉe forta, pro tio naciista agado malkaŝa, per la provoka kandidatigo de la amasbuĉisto Hindenburg. La prezento de Hindenburg evidente montras kiom fortaj sentas sin la monarkistoj en la plej libera respubliko de la mondo, en kiu dum daŭro de kelkaj jaroj kunregis laborista partio. Plej notinda estas la fakto ke la amasbuĉisto antaŭ akcepto de la kandidateco demandis la forkurintan Vilhelmon, ĉu li permesas al li la akcepton de la ofico. Tio plej trafe montras kian prezidanton Germanio povos ricevi. La venko de Hindenburg estas venko de la malkaŝa monarkio en Germanio. Lia konkuranto estas Marx, la kandidato de l'katolika partio (centro), kiu havos la subtenon de la demokratoj kaj ankaŭ de l'socialdemokratoj, kiuj forlasis la propran kandidaton, kvankam tiu estis ricevinta preskaŭ 8 milionojn da voĉoj dum la unua balot-iro. *Voko.*

Kelkaj vortoj pri la voĉdonado en Belgio

En mia lasta artikolo[1] mi prognozis sufiĉan malpliiĝon de la voĉoj por la liberala partio, kaj grandan pliiĝon de la socialistaj voĉoj kaj de la katolikoj. Granda parto de tiu prognozo efektiviĝis. Nur solan eraron mi faris: la sukceso preskaŭ superis mian esperon. Kaj ĝenerala surprizo: la katolika partio perdas 2 deputitojn dum la socialista partio gajnas 11 deputitojn. La liberala partio perdas 11 deputitojn kaj la komunistoj sukcesis dank' al la kuniĝo de pluraj diversregionaj listoj gajni 2 deputitojn. La nova belga deputitaro konsistas do el:

79	socialistoj
78	katolikoj
22	liberaluloj
2	komunistoj
6	aliaj partioj
187	

La socialistoj ricevis proksimume 40 % el la voĉoj. Tiu socialista venko (laŭ la burĝa gazetaro kiu tion konfesas) estas ĉefe kaŭzita de la modela organizo de la socialista partio kaj ankaŭ pro la inteligenteco de ĝiaj ĉefoj. Sed kompreneble ekzistas alia kaŭzo eĉ plej impresiga: La laboristaro komencas kompreni ke la religio estas nur ilo ĝin kaptanta, ke la promesoj de la katolika partio nur similas la neniam ricevitan teron promesitan de la Biblio. Ĝi ekkomprenas sian devon. La reakcio timektremas. Ĝi nun komprenas ke ĝia tuta kontraŭlaborista propagando restis senfrukta. Dum tiu ĉi lasta periodo, la reakcio uzis ĉiujn rimedojn por malebligi socialistan sukceson. Ili presigis afiŝojn kun insultoj abomenindegajn, montrante viron kun tranĉilo en buŝo sia, aŭ sovaĝajn bestojn kies kapoj reprezentis iun ĉefon socialistan. En sia propagando, ili sisteme kunigis socialistojn kaj komunistojn. La samaj insultoj trafis tiujn dupartiajn kamaradojn. Eĉ ili deklaris, ke la disputoj inter la komunistoj kaj la socialistoj estas nur ŝajnaj. Ke enkore kom. kaj soc. interkonsentas. Kaj, k-doj, permesu ĉi vorton, pro kio tiu mensogo reakcia ne fariĝas vera? Pro kio ni, pro la sama celo batalantaj kaj pro la samaj kaŭzoj suferantaj, ne unuiĝas? Pro kio ni ne unuiĝas por kontraŭbatali tiun kapitalistan monstron? Responde al la insultegaj afiŝoj de la reakciaj partioj, la socialista partio eldonis belegan afiŝon, eble la plej elokventan el ĉiuj ĝis nun eldonitaj. Ĝi reprezentas knabineton kies trajtoj enhavas jam la doloron. Ŝiaj okuloj petegas. La subskribo estas jena:

Paĉjo, pensu pri panjo, pensu pri cia filineto: Kaj voĉdonu por la Socialistoj!

Eble kelkaj ne komprenos tion. Ĝis nun la revoluciaj partioj malofte uzis la infanan amsenton. Kaj tamen, bone pripensite, ĉu ne estas la infano kiu pleje indas kompaton, kiu estas la granda viktimo de la kapitalistaro?

90 % el la infanoj mortas junaj. Inter dek infanoj junaĝe mortantaj estas sep infanoj de la laboristaro. Ili ne ricevas sufiĉan nutraĵon. Kaj kiu suferas pli ol la patrinoj pro tiu situacio? Se oni bone ekzamenas, ĉu la senco de tiu afiŝo ne estas plej elokventa?

La infano fariĝas la advokato de la multaj infanoj mortintaj aŭ kriplaj pro nesufiĉaj prizorgoj, kiu petas pli da nutraĵo kaj admonas la patron voĉdoni por la socialistoj, kiuj kontraŭbatalas tiun aĉan reĝimon, kiuj volas ke oni multe subtenu la infanojn por ke estiĝu fortika laboristaro konscia. — Kaj la laboristoj komprenis!

Sed la reakcio ne abdikas; ĝi preparas financan kontraŭbatalon. Reĝo, generaloj, episkopoj, pastroj estas la agantoj de tiu movado. Sed la belgaj laboristoj ne fordonos sian venkon. Kaj se akra batalo estas necesa, ĝi okazos. Kaj la martelo, la falĉileto kaj la plumingo, la armiloj de la proletariaro, venkos la glavon kaj la krucon, armilojn de la kapitalistaro.

Léon Bergiers.

[1] vidi n-on 28.

Al kamaradoj en Blankrusio!

Ni nun havas agentejon en *Minsk*. Vi povas pagi viajn kotizojn por membreco kaj gazetoj, libromendojn ktp. al k-do *D. Snejko*, Poŝtkesto 33, *Minsk*. *Adm.*

La Oktobra fervojo

La Oktobra fervojo etendiĝas de Nordo el Leningrado rekte ĝis Moskvo. Kun flankaj branĉoj ĝi havas longecon de 2400 km. La administracio de la fervojo troviĝas en Leningrad, kie estas 1260 oficistoj; sur la linio estas 29 130 oficistoj, entute 30 390. — Dum tempo de malsato en 1920—1921 jaroj estis preskaŭ 55 000 oficistoj, nuntempe dank' al plisimpligo kaj mallongigo de nebezonaj formalaĵoj oni sukcesis malgrandigi la tutan aparaton. La laboro de la fervojo inkluzive transveturigon de ŝarĝoj kaj de pasaĝeroj atingas preskaŭ la antaŭmilitan normon, kaj jam plu ne mankas lokomotivoj kaj vagonoj.

Ĉiuj loĝejaj aferoj sur la vojo estas transdonitaj al loĝeja kooperacio, kiu jam mem prizorgos kiel remonton tiel ankaŭ konstruadon de novaj domoj; por estonta printempo la administracio de vojo disponigis la bezonatajn materialojn.

Dum lastaj monatoj la salajroj de fervojistoj multe pligrandiĝis, nuntempe plej malbone salajrataj grupoj de kontora laboro preskaŭ atingis antaŭmilitan salajron kaj kelkaj salajroj (vojgardistoj) superas la antaŭmilitan normon je 200—300%. Kvalifikitaj laboristoj ricevas mezan salajron de 100 rubl. (50 dolaroj) monate; konforme al altigo de salajro kreskas produktadkvanto.

Ĉiuj senlaboruloj ĉiumonate ricevas monhelpon kaj senpagan kuracadon por si mem, kiel ankaŭ por familianoj.

Ĉiuj laborantoj krom tio ricevas senpage por si mem kaj familio 6 vojbiletojn por vojaĝo en tuta Sovetlando. Krom tio je duonprezo unu kvadrat-klafton da ligno kaj 10 funtojn da petrolo, kvar biletojn monate por distanco de 500 verstoj (680 km) por si mem kaj familio por alveturigo de provizoj kaj ankaŭ aliajn malgrandajn rabatojn.

Fine oni devas diri, ke tuta vivo sur la fervojo, ruinigita de imperialista milito ree normaliĝas, ĉiuj vundoj resaniĝas, kaj ke ĉio akceptas vivajn formojn de libera lando. *Satano 1081*

La greka fervojista striko

La oficejo de I. T. F. petas nin pri enpreso de jenaj linioj:

En pluraj laboristaj gazetoj oni raportis dum lastaj tagoj pri la fino de l'greka fervojista striko, je kio oni nomas tiun ĉi konflikton "komunista" senkonsidere entreprenita strikmovado, kiu ne atentas pri fervojistaj interesoj. Tiu ĉi opinio estas erara. Kiel la I.T.F. jam sciigis en sia raporto, la striko estis neevitebla, post kiam administracio kaj registaro celis ne nur larĝajn plimalbonigojn, sed eĉ rifuzis plenumi siajn promesojn konsentitajn post la lastjara strikmovado, i. a. la enkondukon de l' okhora labortago.

En ĉiuj lokaj grupoj la strikdecido estis prenita unuanime. Eĉ se la estraro estus kontraŭstarinta, la strikeksplodo ne estus evitita. La partopreno je la striko estis ĝenerala inter ĉiuj grupoj de fervojistoj; po 10 000 personoj ne estis pli ol 20 strikrompantoj. Se la striko tamen fine estis perdita, tion kaŭzas la sinteno kaj la kontraŭrimedoj de la registaro.

Ni per tio nur volas elmontri, ke riproĉoj al la estraro de l' greka fervojista unio estas nemeritataj kaj ne sen danĝero por la grekaj kolegoj, ĉar administracio kaj registaro senindulge maldungas la fervojistojn kaj iliajn gvidantojn. Centoj da gvidantoj kaj agemaj membroj jam estas maldungitaj aŭ maldungotaj. La redungotoj devas deklari, ke ili la difinon pri sia rajta situacio sen pluo lasas al la administracio.

La sekretariejo de l' I.T.F. sin turnis al la greka ministro-prezidanto kaj esploris, kiaj pluaj paŝoj povas esti farataj en intereso de la persekutataj kolegoj.

NOTU! KONGRESONTOJ!

La V-a okazos de 11. ĝis 15. aŭgusto en Wien

La senlaboreco en Aŭstrio

Speciale verkita de SAT-ano n-o 2364, Membro de la "Centra senlaborulkomitato de Aŭstrio"

Du kaj duona jaroj forpasis de la tempo kiam la aŭstria burĝaro pere de la prelato Seipel venigis la ĝenevajn kontraktojn kaj "sanigis" la ŝtaton. La sekvoj de tiu ĉi ŝtatsanigo estas ĝis nun ne ekzistinta mizeriĝo de la Aŭstriaj proletoj. La ĝenevaj kontraktoj enhavas paragrafojn, per kiuj la forigo de la malmultaj ankoraŭ ekzistantaj laboristaj protektleĝoj estas postulata kaj la faktigo de tiuj paragrafoj estas la tasko kaj devo de la registaro. La Aŭstria registaro ankaŭ pene klopodas plenumi tiujn paragrafojn kiuj estas en la intereso de la aŭstriaj kaj eksterlandaj kapitalistoj. 90000 postenhavantojn ŝtatajn la registaro ĝis nun forĵetis el la laborejo sur la straton, aliaj 20 000 ankoraŭ sekvos. Ĉi tiu kunlaboro inter registaro kaj privataj entreprenantoj kaŭzis ke ekzistas hodiaŭ 230 000 senlaboruloj, oficistoj-postenhavantoj kaj laboristoj. La grandecon de ĉi tiu nombro oni povas nur kompreni se oni scias, ke en nia malgranda ŝtato entute nur ekzistas 1 200 000 personoj kiuj por salajro laboras. Sekve signifas tiu ĉi nombro de 230 000, ke ĉiu kvina laboristo, postenhavanto aŭ oficisto estas senlabora. Pli ol 750 000 personojn, — la familianoj estas enkalkulitaj — koncernas tiu ĉi grandega senlaboreco. La sekvo de tio estas terura ĉar en la plej bona kazo familio de kvar personoj ricevas ŝtatan senlaborulsubtenon de nur 18 aŭstr. ŝilingoj posemajne, por kiuj estas aĉeteblaj 19 kg da pano aŭ 4½ kg da graso aŭ ½ paro da malbonaj ŝuoj. Kiel mi jam diris, tio estas ankoraŭ bona kazo, ĉar familioj kun pli ol 4 personoj ankaŭ ne pli ricevas, kaj multaj ne ricevas tiel "altan" subtenon sed malpli altan. Granda parto ankaŭ jam de longe nenion ricevis. Kaj nun la ĉefa afero: laŭ la ĝenevaj kontraktoj estas nur permesate doni al 90 000 senlaboruloj ŝtatan subvencion. La sekvo de tiuj paragrafoj estas ke la penadoj de la registaro sin direktas al tio, forpreni la subtenon de tiuj 140 000 kiuj superas la permesatan staton de 90 000. Kaj jam la parlamento akceptis leĝon, laŭ kiu de la 1. junio 70 000 senlaboruloj ne plu ricevos la ŝtatan subvencion kaj tio nur estas la komenco de pluaj paŝoj en tiu rilato. Nature la registaro jam de longe estus farinta tion, se ne estus faktoro kiu tre malhelpas tiajn fiagojn. Tiu ĉi faktoro estas la organizeco de la senlaboruloj. La senlaboruloj elektis propran reprezentantojn, la tiel nomatajn senlaborulkomitatojn, kiuj ekzistas en ĉiu pli grava loko en Aŭstrio. La lokaj kaj fakaj komitatoj estas reprezentataj en la "Centra senlaborulkomitato de Aŭstrio" kies sidejo estas en Vieno. La Centra senlaborulkomitato eldonas gazeton, la "Senlaborulgazeto" elirantan po 30 000 ekzempleroj. Multaj demonstracioj jam estis aranĝataj de la C.S.K., kaj tio estas la kaŭzo, pro kio la registaro ĝis nun ne kuraĝis tiel akre kaj rapidege forrabi de la senlaboruloj la viveblecon. Kompreneble la pensoj kaj penadoj de la registaro estas detrui kaj disrompi ĉi tiun centran senlaborulkomitaton por sengvidantigi la senlaborulmovadon. Oni enkarcerigis la gvidantojn, aŭ kio estas la pli bona okazo, donis labor-eblecon al ili, por forigi ilin de la senlaboruloj. Ĉiuj registaroficoj de la demokrata respubliko furiozas kontraŭ la senlaborulmovado. Ĉiun demonstracion de la senlaboruloj oni malpermesas. Policatakoj, arestoj kaj malbontraktadoj de la senlaboruloj, kiuj propagandas por la postuloj de la senlaboruloj, estas ĉiutagaj. Mardon la 7. aprilo estis aranĝata demonstracio de la senlaborulkomitato de Aŭstrio. Unue oni malpermesis ĝin, sed en la lasta momento oni donis la permeson, ĉar tiam la senlaboruloj malgraŭ la malpermeso estus ekmarŝintaj. La registaro mobilizis ĉiujn haveblajn fortojn. La sekvo de tiu mobilizado estis atakoj kontraŭ la senlaboruloj. La rezulto estis 20 vunditoj en Vieno kaj 50 vunditoj en Graz, la ĉefurbo de Stirio kaj nekalkuleblaj arestoj de la senlaboruloj per la kuraĝa policaro de nia demokrata respubliko. Policsabro, hokkruculoj [1]) kaj faŝistoj disrompu la fronton de la laboristoj, por ke estu eble forrabi la lastan restaĵon de la leĝoj favoraj al la laboristoj. 12-hora labortago, forigo de la leĝo pri la laboristkonsilantoj (sovetoj), forigo de la luleĝo, forigo de la leĝo pri la asekuro kontraŭ senlaboreco, mizerigo de la laboristoj ankoraŭ laborantaj, ellivero de la senlaboruloj al la malsatmorto aŭ al la memmortigo, — tiaj estas la signaldiroj de la aŭstriaj kapitalistoj. Espereble la aŭstria laboristaro estos sufiĉe batalema kaj klaskonscia por malhelpi tion.

[1]) faŝistoj antisemidaj.

Statistiko pri la vivnecesaĵoj en Germanio

Oni publikigas oficiale: Depost julio de la pasinta jaro la tendenco montras, kun malgranda interrompo de prezaltiĝo, normalan movadon de la germanaj prezoj, sed pli densan apogon je la prezmovo de la mondprezoj (kontraŭe al la prez-evoluo dum la unuaj monatoj 1924). Tio signifas malstreĉiĝon de la likvidmovado, signifas kapital-estiĝon kaj altiĝantan eluzon de kapitalo sur la merkatoj, kiuj servas senpere al la ekonomiaj entreprenoj; sed signifas ankaŭ, aliflanke de la prez-problemo socipolitika kaj dum la tempo de la transformiĝo per la granda diferenco inter la perlaboro kaj preznivelo je la malfortigita aĉetpovo de l' popolamasoj, — devigan retenadon ĉe la aĉeto de bezonaĵoj kaj per tio mizerstaton.

La prezmovado en januaro 1925 montris la saman tendencon kiel en decembro 1924: malgraŭ prezmalaltiĝo de kelkaj produktoj (graso, viando, fiŝaĵo) altiĝis la indekso de la grupo de nutraĵoj (18 specoj) de 131,3 en 30. dec. 1924 ĝis 140,9 en 28. jan. 1925, la entuta indekso de 134,8 ĝis 140,4. Malgrandajn malaltiĝojn montris post altiĝo en januaro la grupoj: haŭtoj kaj ledo, teksaĵoj, metaloj kaj mineraloleoj. La enlandaj produktaĵoj (16 specoj) altiĝis. Laŭ la plej novaj nombroj montriĝas ĝenerala prezmalaltiĝo de 28. jan. ĝis 11. febr. 1925, kiu estas grava en grupo 1 (greno). La entuta indekso 136,0, same la grupo nutraĵo tamen montras spite la lasta reiro altiĝon kontraŭ decembro. La regna indekso por vivnecesaĵoj altiĝis daŭre de 122,9 ĝis 125,1 laŭ la konstato de regna ofico statistika de 30. dec. 1924 ĝis 11. febr. 1925.

Pli klare montriĝas la grava multekostiĝo en la sekvantaj nombroj de la indekso de saksa detalkomerco, kiuj estas konstatitaj sur bazo de la detalvendprezoj, sciigitaj de la saksa landofico statistika. Ili estas kalkulitaj laŭ mezprezoj de la plej gravaj mastrumaĵoj en 8 diversaj urboj:

	1924 Fino de jun.	1924 Fino de dec.	1925 Komence de febr.
Sekalpano	103,6	148,6	164,7
Tritikfaruno enl.	89,1	113,9	120,9
Rizo	103,5	116,0	118,0
Faboj	142,5	147,5	150,0
Bovaĵo	113,5	123,6	123,6
Porkaĵo	111,3	145,0	138,9
Lardo	150,6	192,5	190,8
Butero	138,1	183,0	170,0
Margarino	74,1	92,0	93,2
Graso eksterl.	88,8	129,0	127,3
Salharingoj	119,2	153,0	164,5
Gado	111,6	128,4	155,6
Sukero	170,4	145,0	145,0
Ovoj	178,9	276,3	250,0
Lakto	150,9	165,1	160,4
Karbobrikoj	159,2	150,3	149,2

Kiam oni komparas la estantajn prezojn de kelkaj krudmaterialoj, duonfabrikaĵoj kaj nutraĵoj kun la konformaj antaŭmilitaj prezoj, montriĝas sekvantaj altiĝprocentoj: plumbo 153,9; zinko 70,7; stano 27,7; malnova fero 30,4; benzino 14,3; benzolo por motoroj 85,7; oleo por Diesel-motoroj 20,0; maŝinoleo 69,2; kotono 93,0; lano (Cap snow) 54,1; kotonfadeno 120,2; stebfadeno 155,7; tritiko 20,5; sekalo 55,3; ovoj 150,0; butero 56,3.

La prezformiĝo por sekalo kaj faruno montriĝas en la prezformiĝo de pano. La prezoj de sekalo estis pli altaj je 64% en la 13. febr. 1925 ol en la sama dato 1914, laŭ konstatoj de la Dresdena produkta borso. Ankaŭ sekalfaruno (elmuelita 70%) altiĝis dum la sama tempo je 63%. La diferenco inter sekalo kaj sekalfaruno, samkvalitaj, estis en 1914 je la 13. febr. 51%, en 1925 nur 50,5%. Oni devas konfesi, ke la formiĝo de farunprezoj adaptiĝis al la cirkonstancoj en rajta distanco. Dum la lasta tempo la prezoj por faruno pli malaltiĝis ol la prezoj por sekalo; pro tio la diferenco de la produktprezoj inter sekalo kaj faruno altiĝis nur de 11,25 markoj (je 5. okt. 1924) ĝis 12,75 markoj (je 13. febr. 1925), aŭ laŭ procentoj: 13,5. La detalprezoj por viando malaltiĝis dum la lastaj semajnoj iomete. *Rondlignoj multekostiĝis laŭ la diverseco je 43 ĝis 77%. Haŭtoj de bestoj je 3 ĝis 10%.*

Du Siegmaranoj (1305, 1839).

TRA LA KLASBATALO

En Sofio okazis atenco per eksplodmaŝino kontraŭ la faŝista registaro, kiu troviĝis en katedralo dum entombigo. Ĉiuj ministroj estas pli malpli grave vunditaj, inter ili la fama Cankov. Multaj generaloj, urbestro, deputitoj ktp. estas mortigitaj. Sekvis al la atenco furioza teroro kontraŭ laboristoj-kamparanoj. Multaj laboristoj jam estas ekzekutitaj de lamilit-aŭtoritatoj. En kelkaj regionoj okazas bataloj.

En Portugalio okazis "revolucio" de oficiroj, dum kiu oni per bombĵetoj kaj pafado mortigis multajn personojn. La registaro deklaris militan juron kaj sieĝan staton.

Trocki resaniĝis kaj revenos al Moskvo post kelkaj tagoj.

La Centra Senlaborula Komitato en Aŭstrio estas likvidita de la registaro!

La milittribunaloj mortpafigis en Estonio du gvidantojn de la laborista movado, pro nura denunco ke ili estas partoprenintaj la decembran ribelon.

Reakcia movado ekregas en Japanio. En 7. marto la bilo de kontraŭsocia movado estis akceptita en la parlamento malgraŭ ĉiu kontraŭbatalo de la laboristaj grupoj, k. klaskonsciaj kamaradoj. En tiu tago la parlamento estis gardata de pli ol 3000 policanoj kontraŭ malhelpo de kontraŭuloj. La bilo estas iom simila je leĝo, kiun antaŭe Bismarck efektivigis en Germanio. Laŭ tiu bilo, oni neniel povas subteni socialisman movadon. Kolektiĝintaj socialistoj kunkantis "Revolucian kanton" antaŭ la parlamento, en kiu parlamentanoj diskutis pri la bilo. Arestitoj estis forsenditaj al la Centra Polica oficejo per ŝarĝaŭtomobiloj. *R. O. R.*

Ŝimoi Harkiĉi, prof. en Orienta Instituto, Napoli, Italio, nun estas reveninta en Japanion, k. propagandadas Faŝismon, aŭ Mussolinismon, dirante ke nuna stato de nia lando estas tute simila je tiu antaŭ regado de Mussolini k. estas tre danĝera k. terura. Kaj naivuloj sekvas lin! — *R. O. R.*

Necesas kelkaj personaj vortoj

Lastan jaron, sekve de klopodoj de "Komunista Frakcio el membroj de SAT", la agitfako de Komintern petis raporton pri la esp-a movado. Komunistaj k-doj komisiis min verki tiun raporton. Akceptinte plenumi la taskon, mi provis meti min en la spiritostaton de advokato, pledanta antaŭ juĝistaro por la bono de sia kliento. Mi do uzis ĉiujn argumentojn, kiujn mi opiniis plej kapablaj por sukcesigi ĉe komunista gvidantaro la vidpunkton de mia kliento t. e. esp.to. Tiu raporto estis do absolute privata afero kaj havis tute mallarĝe difinitan celon.

Nu, okazis, ke iu de mi nekonata persono spione havigis al si tiun mian raporton. Verŝajne tiu skribaĵo ŝajnis bona armilo uzinda por ĵeti dubon, suspektemon kaj malkonfidon en la SAT-anajn vicojn. Tiucele la antaŭparolo de mia raporto estis tradukita esperanten kaj rondiras en multaj manoj. Necesas do averti la SAT-anaron pri evidenta malbonintenco de la personoj, kiuj utiligas privatan dokumenton por semi disigajn ĝermojn sur la SAT-kampo.

Tute malkaŝe kaj sentime mi do deklaras ke mensogas la personoj, kiuj, armite per kelkaj diroj el mia raporto, klaĉadas, ke SAT estas sub la regado de Komintern.

La vera vero estas, ke la SAT-aparato celas utili al ĉiuj senescepte laboristoj, unuiĝintaj en organizaĵoj, kies bazprincipo estas la klasbatalo. Se la komunistoj, frakcie organizitaj, bone uzis la aparaton, estas en tio nenio riproĉinda, sed male ĝi estas imitinda de la aliaj SAT-anoj nekomunistaj.

Ankoraŭ unu vorton: Kiuj celus "komunistigi" SAT-on, tiuj estus eĉ malspertaj kaj mallarĝvidaj komunistoj. Almenaŭ mia kompreno de l' komunismo igas min konsideri la organizaĵon de la laboristaj esperantistoj je la sama vidpunkto je kiu mi konsideras sindikaton, kiu trovas lokon ĉiuj ekspluatatoj. SAT ne havus vivpravecon, vivrajtecon, se ĝi celus ludi alian rolon ol tiun, kiu konsistas ebligi la praktikan utiligadon de esperanto por la servo de l' tutmonda proletaro. E. Lanty

La jara libertempo de SAT-anoj

Al gek-doj, kiuj dum la semajno inter 14. kaj 20. de junio povas esti en Stuttgart (Württemberg), ni povos prezenti senpagan manĝajon kaj loĝejon. Dum ĉi tempo okazos "regna laborista semajno".

La plej bona efiko estus, se iu SAT-ano (eksterlandano) dum unu vespero povus paroli esperantlingve pri: Sportularo kaj Esp-o.

Anoncoj plej malfrue ĝis 13. majo al k-do

Fr. Eberhardt (1660), Stuttgart (Germanio) Calwerstr. 39

Internacia Laborista Helpo

Kulturlaboro de ILH

La tasko de la "Laborista Filmo", la ekspluato de la filmo por revolucieca propagando estas eksterordinare grava, sed tre malfacile plenumebla meze de la kapitalista socio, kiu bonege scipovas ekspluati por siaj celoj ĉiujn eblecojn, ĉiujn miraklojn de la filmtekniko. Ekzistas neniu filmo, kiu per ŝajne indiferenta enhavo ne prezentas pli malpli malkaŝe aŭ kaŝe almenaŭ ereton da entreprenista ideologio, mastra moralo kaj finfine ankaŭ neeviteblan aldonon de patriotismo. La plej granda parto de la filmlibretoj tute malkaŝe kaj eĉ akcentite prezentas la stampon de la kontraŭrevolucia burĝeca tendencfilmo. La tiel nomataj revoluciecaj filmoj de la burĝaro, kiel "Danton", "Skaramouche" k. a. prezentas la revolucion kiel terurigan fantomon kun virinaĉoj iĝintaj hienoj.

ILH prenis sur sin la disvastigadon por ĉiuj en Rusio fabrikitaj filmoj. Antaŭ nelonge unuiĝis la rusa filmofico "Prolet-Kino" kun la ILH-Kino al potenca proleta organizaĵo, kiu entreprenos la kreadon kaj disvastigadon de revoluciece propagandaj kaj samtempe artplenaj filmoj samkiel de pure ludecaj filmoj.

ILH kiel la unua organizis la eksportadon de rusaj filmoj en eksterlandon; samtempe ĝi klopodis enkonduki ĉi filmojn en la rusan vilaĝon kaj povis plenumi tion helpe de siaj komitatoj.

La unua filmo de la ILH devenis el la malsatantaj regionoj sub la titolo "Malsatado en Rusio". Sekvis "Ruĝa Armeo", "Popoloj de la Oriento", "Popol-Majo", "Enterigo de Vorovski", "Polikuŝka", "La miraklo de l' soldato Ivan", "Enterigo de Lenin", "Rusaj infanhejmoj", "Internacia Laborista Helpo".

Ĉi tri lastajn oni nun prezentas en Germanio kaj parte ankaŭ en Ameriko kaj Francio.

Paŝo al Solidareco Internacia

Forveturis Londonon 11. aprilo k-do Tomski kaj la aliaj sovetaj sindikat-reprezentantoj. Spite la fiĵurnaloj kiuj mensoge atakis la "bolŝevik-lupojn", la britaj reprezentantoj subskribis kun ili dokumenton plensignifan. La brita sekcio de la I.F.T.U. (Amsterdam) petos aranĝi senkondiĉan konferencon por diskuti pri unuigo kun la sovetaj sindikatoj. Inter la soveta kaj brita sekcioj jam efektiviĝas konstanta komitato de inter-helpo.

Antaŭ ol ili foriris en la iaman ambasadorejon de la Caro, la sovetaj kaj britaj k-doj festis la sukceson. Bedaŭrinde kiam k-doj Tomski, Lepse, Aviloff, Michailoff kaj k-dino Olga Ĉernihova paroladis ruse, ni povis nur kompreni post traduko. Same kiam Bramley, Cook, Tillet kaj aliaj parolladis angle por la rusoj.

SAT ankoraŭ havas sulkon plugendan.

M. St.

Britaj laboristaj gvidantoj subskribas gravan manifeston

(La Brita Ligo de Esp.-Socialistoj dissendis la jenan manifeston kun "Senn." kaj aliaj Esp. dokumentoj. Kelkaj gvidantoj jam konsentis subskribi.)

Ĉiutage la lukto de la laboristoj tendencas pli kaj pli efektiviĝi sur la kampo internacia. La funkciado de internaciaj trustoj monopole regantaj la nutron de la popolo kaj atakantaj la viv-normon de la laboristoj; la aktiveco de mondaj financestroj kaj armilaraj firmoj, kaj la starigo de sekretaj interkonsentoj (paktoj) inter reakciaj registaroj, ĉio ĉi necesigas por la laboristoj sindefendan agadon laŭ internacia skalo. Por ke ili evitu la intensivajn teruregojn de novaj militoj, la popoloj de la tero devas lerni pli kaj pli kunlaboradi. Malkomprenon kaj naciajn antaŭjuĝojn ni devas forigi per konstato de la fakto ke la laboristoj en ĉiu lando devas kontraŭbatali la samajn problemojn kaj la saman malamikon.

Depost tiu glora klopodo de la Unua Internacio (1864) estis multfoje provoj unuigi la laboristaron de la mondo. Multaj el la bariloj kontraŭ frateco inter popoloj malaperas. La aeroplano kaj la radio (senfadena telefonio) ignoras landlimojn naciajn kaj kompletigas la kunligadon de la mondo iniciatitan per la lokomotivo, la vaporŝipo kaj la telegrafkablo. Por bono aŭ malbono ĉiu parto de la mondo estas interdependa. Sed restas la plej grava barilo — diverseco de lingvoj. La lingvo estas la ĉefa ilo per kiu la homa kunagado ebliĝas, kaj la manko de komuna lingvo inter la laboristoj de la mondo konsistigas barilon fortikan kontraŭ vasta kunagado internacia. Ĝenerale la laboristoj havas nek la tempon nek la energion por fariĝi poliglotoj. Cetere, ne estas bezono, ke ili entreprenu la taskon, ĉar ekzistas pli simpla kaj pli bona solvo. Ĉiu nacia sekcio laborista uzu la helplingvon por sin internacie komprenigi. Jam Esp. kiu estas simpla, kiel ankaŭ neŭtrala egale por ĉiuj nacianoj, estas pruvita dum pli ol tridek jaroj, kaj montris ke ĝi povas helpi la esprimon de la solidareco de laboristaro. Kredante, ke internacia kompreno inter la ordinara popolo de ĉiuj landoj estas necesega, ke Esp. akcelus tiun komprenon, kaj tre faciligus la laboron de internaciaj organizaĵoj — speciale ĉe kongresoj, kaj ke la laboristoj uzante Esp.-on en korespondado kaj vojaĝado povus akiri internacian vidpunkton kaj starigi ĉiu-lande ligilojn de amikeco — ni bonvenigas la progresadon de la internacia lingva movado kaj esperas ke Esperanto fariĝos akceptita parto en ĉiuj laboristaj-edukadaj programoj kaj ke pli kaj pli multaj laboristoj faros uzon el ĝi. Per la disvastigita apliko de la internacia lingvo — "la ABC de la Internacio" laŭ Henri Barbusse — la laboristoj gajnus la internacian vidkapablon, sen kiu la mondo pereos.

(Subskribita)

C. Roden Buxton, kasisto de la I.L.P., verkisto kaj eks-parlamentano.
H. H. Elvin, Sek. de la N.U.C., sindikato de la komizoj.
Alex Gossip, Sek. de la N.A.F.T.A., sindikato de la meblistoj.
C. T. Cramp, Sek. de la N.U.R., sindikato de la fervojistoj.
J. W. Bowen, Sek. de la U.P.W., sindikato de la poŝtistoj.
G. Hicks, Sek. de la A.U.B.T.W., sindikato de la konstruistoj.
A. J. Cook, Sek. de la M.F.G.B., sindikato de la karbministoj.
Robt. Williams, Administranto de la "Daily Herald".
Frank Hodges, Eks-Ministro kaj venonta Sekt. de Internacia Karbminista Sindikato.
Robt. Smillie, M.P., heroo kaj batalanto de la karbministoj.
Tom Mann, mondkonata pioniro en laborista organizado.
A. B. Swales, Prezidanto de la Brita S.T.U.C.
George Lansbury, M.P., plej bone fidata estro.
Margaret G. Bondfield, Eks-Ministrino kaj virinsindikata organizistino.
Ellen C. Wilkinson, M.P., iama parlamentanino.
S. Saklatvala, M. P.

Klarigo pri ĝenerala kunveno de "Lab. Ligo Esperantista" en Ĉeĥoslovakio

La gek-doj ĉeestintaj la ĝeneralan kunvenon de L.L.E. ĉiuj certe tre miris, komparante la fakton kun la enhavo de la artikolo en n-o 25 de "Sennaciulo".

Pro la sama motivo kaj por diskonigi nepran veron pri tiu ĉi afero la komitato de la Ligo decidis, sendi jenan informon:

Lab. Sekcio Plzen-Karlov faris proponon, ke oni rekomendu al la membraro aliĝon al SAT. Por sekcio Karlov parolis k-doj *Büchl* kaj *Štádler*, kiuj klarigis kial ilia sekcio preferas SAT.

Post ĉi tiuj parolis k-do *Pešek* kiu diris, ke li estas por SAT malgraŭ tio, ke al li ne plaĉas ĝia politika nuanco.

Nun aliĝas al parolo k-do *Burda*. La prezidanto k-do *Pešek* demandas la delegitojn, ĉu povas paroli k-do *Burda*, ne estante rajtigita delegito. Ĉiuj konsentas, ĉar oni volas aŭdi ĉies opiniojn.

K-do *Burda* subtenas la proponon kaj rekomendas ĝian akcepton.

Sekvas paroloj de k-doj *Hovorka, Büchl* kaj *Stádler* kaj ĉi lasta postulas, ke la prezidanto voĉdonigu pri la propono. Sed, ĉar aliĝas al parolo k-dino *Melková*, k-do *Pešek* atentigas pri la graveco de la propono kaj ke oni donu okazon al ĉiu aŭdigi siajn opiniojn.

K-dino *Melková* direktas demandon al k-do *Burda*, kial SAT akceptas subvencion de Moskvo kaj diras, ke ŝi, pro tiu ĉi kaŭzo devas kontraŭstari.

Demandita k-do *Burda* respondas, ke ne estas mirinde, ke laborista rusa ŝtato subtenas laboristan SAT kaj se ŝi aŭ k-do *Pešek* volus ĝin subteni, ke ĝi ilian subtenon akceptus same.

Aliĝas k-do *Kajzer* kiu diras, ke, ĉar la plimulto estas por SAT, oni deprenu de li la funkcion de UEA-delegito.

Tio ĉi estis akceptita, okazas voĉdono kaj la propono estis, kontraŭ voĉo de k-dino *Melková*, akceptita.

Tio ĉi estas la tuta traktado pri la propono kaj ĉio alia en artikolo skribita estas aŭ malvera aŭ aliigita.

K-do *Štádler* diris, ke oni ne timu la povon de Moskvo tro multe, ke komunistoj estas ankaŭ laboristoj, sed tiujn ĉi vortojn li ne direktis al k-do *Pešek*, sed al ĉiuj, kiuj pro tiu ĉi kaŭzo volus kontraŭstari. Li ankaŭ ne parolis pri iaj Espero-Pudro aŭ Espero-Haŭtkremo, kion li juĝus sensenca ĉar ĉiu povas siajn komercajojn nomi kiel ajn.

La prezidanto, k.do *Pešek*, ne malpermesis al k-do *Burda* paroli, kaj li eĉ ne povis tion ĉi fari pro tiu simpla kaŭzo, ke deziris klarigon k-dino *Melková*, do oni ne bezonis "unuanime" devigi prezidanton doni al k-do *Burda* parolon. Skribi pri iaj ruĝiĝo, paliĝo kaj senfortiĝo de k-do *Pešek* estas tre abomena elpensaĵo.

La stilformo de la artikolo evidente celas ridindigi kaj malebligi k-don Pešek inter ĉeĥoslovaka kaj fremdlanda laboristaroj. Ankaŭ rimarko je la fino de la artikolo, ke k-do *Pešek* rikoltos la fruktojn sur la kampo de U.E.A., vidigas la samon.

La ĉeĥoslovakaj laboristoj deklaris, kie estas kampo por ilia laboremo kaj sur tiu kampo, konforme kun la tutmonda laboristaro, ili ankaŭ laboros.

Svaz dělnických "Esperantistů"
v. Československé republice se sidlem v Plzni

Pavlata Rud. vic. prezidanto.
Dragoun Josef sekretario.

RECENZEJO

Libroj

Unuekzemplere ricevitaj libroj: *George Fox* de Henry van Etten, 136 Bishopsgate, London, E. C. 2.

Skotlanda Pejzaĝo, Higgie & Co., Rothesay (Britio).

La Urbestro de Zalamea de Calderon de la Barca, el la hispana lingvo tradukita de Enrique Legrand, Strato 25 de Mayo, 734, Montevideo (Uruguay S. A.)

La Victoria de Federica Monseny. Hispanlingva volumo 216-paĝa havebla ĉe "La Revista Blanca", Oliveras, 30 (Guinardo) Barcelona.

Sonetti de Piero Padulli, ĉe la aŭtoro 26, via Borgonuovo, Milano (2).

Spriritisme Sincériste de Le Clément de St. Marcq, Waltwilder par Bilsen (Belgio).

Les grandes Erreurs de Adolphe Magder. Eldonejo: L. Beresniak, 12, rue Lagrange, Paris.

Les enchaînements de Henri Barbusse, duvoluma gravega verko eldonita de Ernest Flammarion, 26, rue Racine, Paris. Tiu verko estas priparolota en S. R.

La Langue Internationale, *Ce que tout militant ouvrier doit connaître de la question.* (La lingvo internacia; kion ĉiu laborista propagandisto devas koni pri la demando) de *E. Lanty.* Eldonis: Féderation Espérantiste Ouvrière, 177, rue de Bagnolet, *Paris* (XX). Formato: 19×12 cm., 72 pĝ. plus 6 portretoj (Nathans, R. Rolland, H. Barbusse, Lunatĉarski, Toller, Purcell) sur apartaj belpaperaj folioj. Prezo: 2,50 fr. fr.

Jen verketo tre komprenebla, tial ke ĝi estis konceptata de spirito tre klarvida kaj plene konscia pri la celo trafenda. Miascie, neniu antaŭ Lanty faris tian laboron, kiu montras la "historian proceson" nepre kondukantan al lingva unueco tutmonda.

Por argumentadi sian tezon la aŭtoro ĉerpis referencojn el verkoj de plej aŭtoritataj lingvistoj, kiel ekzemple el tiuj de A. Meillet, profesoro ĉe "Francia Kolegio".

Montrinte, ke la propagandistoj de mondlingvo laboras laŭ la fluo de la historia evoluo, kaj ke konscia volo akcelas tiun evoluon, li faras historian resumon pri la diversaj projektoj de artefaritaj lingvoj. Per faktaj argumentoj nerefuteblaj li pruvas, ke la nura solvo de l'problemo pri tutmonda interkompreniĝo kuŝas en la disvastigo de la Zamenhofa lingvo senfine evoluebla.

Miaopinie, estas neeble en sama konciza formo diri pli multon kaj pli trafe ol estas dirite en tiu verketo nepre necesa al ĉiu esp-a propagandisto, deziranta posedi logikan argumentadon pri la mondlingva temo. *P. L.*

LINGVAJ STUDOJ

Permesu, ke mi aldonu kelkajn kompletigajn rimarkojn al la jusa artikoleto de Krjukov pri genitivo:

1. Por esprimi la "genitivon de direkto" (pli ĝuste: de deiro), Zamenhof uzas ofte: *For de.*

2. Por esprimi la "genitivon de akuzativo" (pli ĝuste: uzatan por montri la celon de ago) Zamenhof uzas plej ofte la prepozicion *al,* kelkfoje *por* aŭ *pri* aŭ simple same, kiel proponas Hrebtovskij, la *akuzativon*; ekz.: "Tre grava por la progresado de l' lingvo estas diligenta uzado *ĝin* en korespondado." Tia zamenhofa senprepozicia akuzativo post verba substantivo estas tute logika dirmaniero; ĝi estas kutima ĉe la vulgara latino, ĉe la slavaj lingvoj kaj ankaŭ ĉe la angla lingvo, kiu uzas la participon kiel verban substantivon; ekz.: *Upon my approaching them. — By distributing information and organising examinations.* Se oni tion preferas, oni povas ankaŭ, laŭ la ĝenerala regulo, anstataŭigi tiun ĉi akuzativon per la prepozicio *je.*

3. La adverbigo estas certe tre bona maniero por esprimi la "genitivon de materialo"; tamen oni atentu, ke la prepozicio *el* estas pli ofte uzita de Zamenhof por tiu ĉi senco. Oni povas ankaŭ en multaj okazoj, kiam konfuzo estas neebla, uzi la prepozicion *per,* ĉar *per* ne montras eksklude nur la ilon, sed ankaŭ ĝenerale la *rimedon.* Sed la propono de Crooke uzi *je* estas forjetinda, ĉar oni devas rezervi la nedifinitan prepozicion *je* por la okazoj, kie ĝi estas vere necesa pro manko de alia taŭga precizsignifa prepozicio.

4. La ĝeneraligon de la poseda finiĝo *es* mi ne opinias rekomendinda, ĉar *es,* laŭ la Fundamento, ne ekzistas aparte. Preferinda estas la adjektivigo (*patra* anstataŭ *de patro, lingva* anstataŭ *de lingvo*) aŭ la uzo diversajn pli precizajn prepoziciojn.

5. La propono de Krassovskij asigni al la prepozicio *da* duan signifon por esprimi la "genitivon de ago" (aŭ alivorte: uzatan por montri la aganton de la pasivo) ŝajnas al mi nekontraŭfundamenta kaj nepre provinda, ĉar la nuna unusenca uzado de *da* post kvantaj vortoj estas tre malofta kaj nenia konfuzo inter ambaŭ sencoj estus ebla. *E. G—M.*

KORESPONDEJO

Al div. Viaj artikoloj aperos iom post iom. Ĉiujn neurĝajn art. ni devis prokrasti por venontaj n-oj. *Red.*

409. 50 kr. ĉ. ni ricevis.

3698. Ricevis vian send. Aliĝilo ne ekzistas kaj ne necesas. *Adm.*

Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

G. Brojdo (Daŭrigo)

Tia estas en la ĝeneralaj trajtoj la nacia politiko de l' burĝaro dum la analizata epoko. Ni esploru ĝin pli detale en ĝiaj plej esencaj momentoj.

9. Kio estas naciismo?

La naciismo — estas politiko de la burĝaro, direktita por apartigi popol-amasojn de iu nacio for de la aliaj kaj por organizi malamikajn rilatojn inter ili.

Tiu ĉi politiko esprimiĝas en la disvastigado per siaj administro-kaj eduko-aparatoj (lernejo, gazeto, libro, teatro k. t. p.) de "amo al la patrio kaj de nacia fiero", kaj de malamikeco, malamo al aliaj popoloj, kontraŭ burĝaro de kiuj konkuras burĝaro de tiu ĉi nacio pro la merkatoj de vendado, aĉetado de krudaĵo, merkatoj de laborforto kaj kapital-apliko.

La naciismo transformiĝas en ŝovinismon, plej akre esprimitan formon de naciismo, konforme al la pliakriĝo de l' konkurado inter burĝaro de du nacioj.

La tuta tiu ĉi kapitalisma politiko estas direktata por prepari tian staton de vastaj amasoj, dum kiu burĝaro povus ilin ĵeti en la militon kontraŭ alia popolo por defendi la klasajn interesojn de l' burĝaro. Ju pli krize statas burĝaro en sia batalo kontraŭ burĝaro de alia popolo, des pli energie disvolvas ĝi sian naciisman politikon, des pli alten leviĝas la ondo de naciismo, ŝovinismo, homa malamo.

Kiam burĝaro havas sufiĉan tempon por alproprigi, sen rezisto de alilanda burĝaro, la merkaton, konsistantan el homoj de alia nacio, ĝi efektivigas politikon de asimiligo.

Asimiligo devenas de la latina vorto "similis", kiu signifas — simila, identa.

Asimiligo estas politiko de identigo, de neniigo de naciaj apartecoj ĉe iu popolo kaj de altrudo al ĝi de alipopola lingvo kaj kulturo.

Ekzemple, grandrusa burĝaro estis efektiviganta la asimiligan politikon, disvastigante sian influon al oriento, inter ĉuvaŝoj, zirjanoj k. al., ĉar ĝi ne renkontis reziston flanke de ne jam naskiĝinta ĉuvaŝa, zirjana burĝaro, kaj ĉar, aliflanke, mankis alia granda konkuranto, celinta la ĉuvaŝan aŭ zirjanan merkaton.

Tial ĉi tie la naciisma politiko estis efektivigata per la vojo de "paca" asimiligado: kulturado de ortodoksa religio, rusa lernejo kaj rusa lingvo, k. t. p.

Sed ankaŭ ti-kie burĝaro efektivigas la konkiran politikon, — ankaŭ tie post la perbajoneta trankviligo ĝi komencas sisteman asimiligadon, kiu devas plifirmigi ĝian influon, gvidadon en la konkirita lando kaj transformi la konkiritan landon en la unuecan kun ĝi nacion.

Sed siaflanke burĝaro de la lando, kontraŭ kiu estas efektivigata la ekonomia kaj naciisma ofensivo, agas per la sama armilo de naciismo.

Depende de la fort-interrilato de du interbatalantaj naciaj grupoj de burĝaro, ilia naciismo estas ofensiva aŭ defenda.

La ofensiva naciismo esprimiĝas en la formo de aktiva agado de naciistoj, direktita kontraŭ alia nacio.

Tia formo de naciismo ĉiam konformas al interesoj de la ekonomie ofensivanta burĝaro. Politike ĉi ofensivo esprimiĝas en la formo de speciala leĝaro, limiganta la rajtojn de tiu nacio, kontraŭ kiu ekonomie ofensivas la burĝaro, en plifortigo de ŝovinisma agitado kaj de altrude-asimiliga laboro ktp., aŭ en preparado al ofensiva milito, se la burĝaro estas organizita en apartan ŝtaton.

Naciismo defenda sin montras ĉe tiu nacio, kiu, estante pli malforta aŭ ekonomie kaj politike premegita, povas kontraŭmeti al la ofensiva naciismo nek la ekonomian potencon, nek la konforman ŝtataparaton.

La defenda naciismo sin esprimas jenaforme: la burĝaro plifortigas sian laboron por ke la tuta "popolo" konservu sian "nacian spiriton", sian religion, siajn naciajn morojn; ĝi kondukas al apartiĝo, enfermiteco, forigeco de la tuta alia mondo.

(Daŭrigota) Trad. *P. Jakovlev.*

SUPLEMENTA FOLIO AL "SENNACIULO" N-o 31 — 30. APRILO 1925

LA LERNANTO

LA ATEISTAN KRESTOMATIETON "KONTRAŬ DIO" ĈIUJ KAMARADOJ LEGOS KUN ĜUO

Senrajtigito

Mi estas ŝtelisto… Jen!…

Kiam mi venis al vivo, mia patrino forlasis min en la infanrifuĝeja vindilo.

Ĉu mi estas la nedezirita filo de l' malvirto, de l' malvirgigo, de la malnoblaĵo, aŭ eble de ama nokto?…

Ĉu mi estas la filo de orgia nokto de aristokratoj, aŭ la produkto de l' karna renkontiĝo de du gealmozuloj en volupta stato, en la ombroj de l' nokto?…

Mi ne scias tion… Nek tio interesas min.

Mi scias nur, ke mi estas la Malkontentulo, kiu travagas kaj krias, la Malamo enkarniĝinta… Kaj tio al mi sufiĉas.

Al mi oni ŝtelis ĉion.

La pripensado aŭ la mizero ŝtelis al mi la dolĉan amemon de ia patrino kaj la protektadon de ia patro.

La azilo de mi rabis la Morton, kiu ĉiam estas liberigo por la bastardaj filoj de l' diboĉado, aŭ la amon, kaj ĉagrenis mian infanaĝon mortigante la noblecon de miaj sentoj.

La mondo, kunkulpulo kaj responda pri mia senkuraĝiĝo, signis mian frunton per la insulteganta marko de la adultaj filoj.

Kaj mi dankis al azilo forkurante el ĝi kaj ĝin malamante; al mondo deklarante la militon; kaj al miaj gepatroj… ne pretendante ilin koni.

Mi volis labori kaj mi min sentis rabita, insultmokita kaj malŝatita.

La honestuloj kolektas ŝvitojn, larmojn kaj gustumas la mielojn de ĉiuj plezuroj. Mi ĉesis labori, ĉar laborante oni ne vivas kaj ĉar mi preferas rabi ol esti rabata.

Plie, mi sentis la neceson vivi, kaj mi konsideris min sufiĉe forta por konkiri la vivon aŭ perei ne malantaŭenirante nek tremante en la batalo…

Kaj mi min ĵetis en la lukton.

Kaj baldaŭ mi estis triumfanta, ĉar ne ekzistas kaso rezistanta mian ruzecon, mian maltimecon kaj mian kuraĝon, nek riĉula paperujo de mi ne forprenita.

Mi estas artisto…

Kaptita de viaj hundeculoj, kiuj perfidis min, post tio, ke mi ilin subaĉetis, mi estas en via povo, ho, juĝistoj!

Mi vin konas perfekte por ne ignori kion mi povas esperi de vi.

Vi estas honoraj industriistoj, el tiuj, kiuj fabrikas monerojn el la ŝvito, la larmoj kaj la sango de l' malfeliĉuloj.

Mi estas via konsekvenco, via minaco kaj via puno.

Tial vi ne estos kompatemaj pri mi, nek mi petegas, ke vi estu.

Mi disrompos iam la katenojn, per kiuj vi ligos miajn krurojn; mi dispecetigos la kradon de la ĉelo, en kiun vi min enmetos, ĉar ne estas obstakloj, kiuj povos rezisti feran volon, kaj mi reiros alifoje sur la straton, por daŭrigi mian taskon malplenigi viajn kasojn, senigi viajn poŝojn… .

Popola sango, via oro; tre juste estas, ke mi, kiu renversiĝos sur la pli malsupraj socifundoj, ĝuu ankaŭ el ĝi.

Almenaŭ mi estas pli kuraĝa kaj sincera ol vi, do mi kraĉas en la vizaĝon de l' mondo.

— Mi estas ŝtelisto… Jen!…

Fructuoso Vidal

El la kastillingvo esperantigita de Satano n-o 356

La historio pri la naiva simio

Estis foje simio, kiu el arbo apud rivero rigardis segadon de viro. Kiam li dum momento foriris de sia laboro, la simio grimpis malsupren al la tero, ekprenis la segilon kaj rapidgrimpis kun ĝi supren en la arbon. Alte sur branĉo lokiĝis la simio; imitante la movojn de la viro ĝi komencis segi sur la branĉo ĝis tiu estis trasegita kaj kun brukrako kune kun la simio falis en la riveron, sur kies akvo la branĉo etendiĝis kaj kie, sub ĝi, la simio fariĝis facila kaptaĵo al la krokodiloj de la rivero.

Kiu estas simila al tiu naiva simio? Vi, neorganizito, pripensu nur:

Kion vi faras kiam vi malproksimiĝas de kleriga agado de la laborista movado kaj senpripense donas vian aprobon al tiuj, kiuj batalas kontraŭ la socialismo?

Kion vi faras kiam vi malŝparas vian monon por alkoholaĵoj aŭ uzas ĝin por al la laborista klaso malamikaj celoj?

Kion vi faras kiam vi rifuzas aparteni al la organizaĵo kaj per tio devigas viajn laborkamaradojn esti sklavoj por nesufiĉa salajro?

Kion vi faras kiam vi perfidas viajn kamaradojn en la faka aŭ politika bataladoj, farante strikrompantan laboron aŭ voĉdonante favore al la reprezentantoj de la supera klaso?

Vi forsegas sub vi la branĉon.

Vidu nur, per kiuj avare brilantaj okuloj viaj subpremantoj rigardas vian faradon. Ili starigas sian esperon je vi, ĉar ili scias, ke vi difektas la potencon de la organizaĵoj, detruas la fruktojn de la laborista movado, — ili scias, ke la neorganizito donas al la labordonanto eblecon plene proprigi la laboriston — kaj ankaŭ vin! — en sia perforto, por ekspluati lin ĝis la lasta sangoguto.

Tial ekvekiĝu antaŭ ol estos tro malfrue! Rigardu ĉirkaŭen, lernu koni viajn subpremantojn kaj lernu koni la signifojn de la laboristaj organizaĵoj! Aliĝu al niaj vicoj kaj partoprenu en la batalo por emancipo de la tutmonda gelaborista klaso!

El sveda lingvo tradukis *Karl Johansson.*

Ĉu tio ne estas kurioza?

Se vi batas homon sur la kapon per bierbotelo kaj li mortiĝas pro tio, tiam vi estas murdinto. Sed se dekduo da dandaj friponoj instigas milionojn da homoj por mortbati sin unu la alian pro metal- kaj karbominoj, tio estas sankta batalo, kaj ĝiaj iniciatoroj ricevas ordenojn kaj honorpoziciojn. Se vi ŝtelas al mi mian poŝhorloĝon — ĝi valoras eble tri markojn — tiam vi estas ŝtelisto. Sed se vi povas vendi horloĝojn, kiuj havas realvaloron de tri markoj, por tridek markoj, tiam vi estas brava negocisto. Se vi agas por viaj kunvivantoj, kiuj devas labori dekdu horojn por trinkmono, vi estas pagata agitanto, malŝpareganto de laboristaj groŝoj, manĝujposedanto[1]). Sed se vi neniam laboras kaj vivas per salajrŝtelado, tiam vi estas korifeo de la nacia ekonomio, la ministroj klinas sin antaŭ vi, kaj la pordoj de la "societo" estos malfermitaj al vi. Se vi kredas al la enhavo de la kapitalista gazetaro, la fidela helpanto de la grandaj spekulaciuloj, kiel evangelio, — vi estas honorata kiel politike saĝa homo. Sed se vi kritike ekzamenas la prezojn kaj faras al vi vian propran juĝon, tiam vi estas suspektinda persono. Se vi provas moderigi vian laborefikon por gajni iom pli da paneroj por viaj infanoj, vi estas bolŝeviko. Sed se vi dum milito gravajn krudmaterialojn eksportas en la eksterlandon, aŭ se vi nutraĵojn retenas tiel longe, ĝis la prezoj kariĝas, vi estas granda ekonomia gvidanto, kaj la registaro preferas vin kiel kompetentulon. Se vi montras la militkulpon de la militprofituloj kaj mallaŭdas la mizeran nekapablecon de la registaroj, firmigi la paĉon, tiam vi estas "ponardpuŝanto" (frontembuskanto). Sed se vi kriadas kaj laŭtigadas kune kun la bando, pagata de la pezindustriaj koruptsumoj, ke ne ekzistas pli bonaj kaj malprofitemaj homoj ol la militproduktantoj, kaj ke la propra registaro estas nepre senriproĉa, — tiam vi estas vera patrioto.

(Fritz Kummer
en la germ. metallaborista gazeto, *trad. M. S.*)

Aforismoj

Vi vane provas antaŭ la riĉulo kliniĝi, — jen li montras al vi vizaĝon, jen la dorson.

Malriĉeco estas konstante malfeliĉo, riĉeco iam puno.

M. Rozenfeld.

* * *

La teologoj estas blinduloj, kiuj volas klarigi al aliaj blinduloj kolornuancojn de la portreto, kies originalo ne estas por ili eĉ palpebla.

Golbaĥ, *"Sistemo de la naturo"*.

* * *

Likvido de la religio, kiel fantoma feliĉo de la popolo estas postulo de ties vera feliĉo.

Marks,
"Al kritiko de la filozofio de l' juro de Hegel".

1) postentenanto (bonzo).

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG